# INTER NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 171 Julio 2000



Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@esperanto.nu

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

**NdlR: Mi pardonpetas pro la malfrueco de ĉi tiu numero. Je la nuna momento mankas al mi sufiĉe da materialo por dividi inter ni. Mi aparte bonvenigus viajn eldoneblajn komentojn, leterojn, ŝercojn kaj artikolojn por plenigi gxin. Dankon, ekzemple, al Ed Harler kiu lastatempe petis ke ni aldonu freŝan liston de ricevantoj.**

## VENU AL NOVA SKOTIO

En la junia numero, la eŭropanino Dominique Marcon priskribis kiel ŝi ĝuis pasintjaran viziton al orienta Kanado, kaj ŝi laŭdis la gastamon de nov-skotianoj. Esperantistoj estas internaciistoj kiuj ŝatas viziti malsamajn regionojn kaj lerni pri aliaj kulturoj. Ĉi-monate, ni kuraĝigas vin viziti la provincon de Nova Skotio. Ni skizas la geografion, la vidindaĵojn, la loĝantaron kaj la eventojn kiujn oni povas sperti dum somero en la „oceana ludejo de Kanado".

Kiel oni priskribu ĉi tiun regionon kaj distingi ĝin disde iu alia en la mondo sen fariĝi tute enuiga? Kompreneble, efika maniero simple estus montri al vi multajn plenkolorajn bildojn de la vidindaĵoj, kiel en luksa turista broŝuro. Tion ni ne kapablas fari, do vi mem devas imagi tiajn bildojn. Bildigu al vi, ekzemple, marbordan ĉefvojon kiu serpentas super kaj ĉirkaŭ verdaj, arbar-kovritaj deklivoj — kaj foje griza krutaĵo — kiuj rapide falas en la maron. Tio estas la bone konata „Cabot-Vojo" sur la insulo de Kabo-Bretono. Bildigu al vi grandegan ĝibdorsan balenon kiu superas la supraĵon de la maro en la Golfo de Fundy, apud boatpleno da homoj kiuj venis por vidi ĝin. Eble vi bildigu al vi stratmuzikiston kiu staras sub oficejturo ĉirkaŭitan de homamaso en la posttageza suno antaŭ velŝipo ĉe kajo en la urbocentro de Halifakso. Bildigu ankaŭ al vi blankan marbordan lumturon sur rondigitaj granitaj montetoj apud vilaĝeto ĉe la Golfeto de Peggy. Se estas tro malfacile por vi imagi ĉi tiajn bildojn, eble vi trovos pli da informo ĉe retpaĝoj kiel http://explore.gov.ns.ca/ aŭ http://ttg.sba.dal.ca/nstour/.




La dua plej malgranda provinco de Kanado kun areo de 55,491 kvadrat-kilometroj, Nova Skotio estas strange formita duoninsulo kaj granda insulo, kiuj frontas la atlantikan oceanon kun 7579 km-oj de marbordo. Oni neniam estas tro for de la maro, kaj la maro daŭre influis kaj influas la klimaton, la ekonomion kaj la kulturon de la regiono. Duonvoje inter la ekvatoro kaj la norda poluso, la regiono havas moderan klimaton kiun influas la maro. La plejparto de la tereno estas kovrita de koniferaj kaj ankaŭ falfoliaj arbaroj, sed en la dek procente kultivebla parto oni kreskigas vegetalojn kaj fruktojn kiel pomojn, fragojn kaj mirtelojn. Naturaj rimedoj estas relative malmultaj, kaj tio klarigas la relative malfortan ekonomion de la regiono. Fiŝkaptado, arbar-kultivo, minado kaj diversaj malpezaj industrioj kombinas kun naciaj agadoj kiel la mararmeo kaj la kutimaj diversaj ekonomiaj agadoj de bonhava socio por dungi la plejparton de la laboristaro. Maldungado estas pli grava problemo ĉi tie ol en pli disvolvitaj regionoj de la lando, sed novaj entreprenoj kiel tergaso kaj komputiko provizas novajn laborlokojn. Oni ne tiom ofte devas serĉi la vivrimedon en meza aŭ okcidenta Kanado aŭ en Usono kiel en antaŭaj jaroj. Antaŭ pli ol 20 jaroj mi mem translokiĝis al Manitobo por trovi laboron sed, kiel multaj aliaj, mi revenis. Ankaŭ multaj homoj kiuj ŝatas la pli malstreĉitan vivstilon venas kaj restas ĉi tie.

Malpli ol miliono loĝas en Nova Skotio, triono en la ĉefurbo, Halifakso, kaj la loĝantaro devenas de diversaj mondopartoj. Dum prahistoriaj tempoj, ĝis la pli-granda enfluo de eŭropanoj dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj, loĝis ĉi tie la indiĝena mi'gmaha (Mi'kmaq) popolo, kaj kelkaj ankoraŭ restas ĉi tie. Ondoj da enmigrantoj alvenis diversmaniere, unue de Francio, poste de Britio, sekve de Germanio kaj multaj aliaj eŭropaj landoj. La "Loĝejon" (Habitation) de Port Royal ekfondis francoj en 1605 post jarcento de porokaza fiŝkaptado en la regiono. Post 150 jaroj, kiam la franc-parolantaj akadianoj rifuzis ĵuri lojalecon al la angla reĝo, oni forpelis ilin dum la Elpelado de 1755 kaj dispelis ilin tra la mondo, inter alie al Louisiana en Ameriko. Post kelkaj malfacilaj jaroj revenis triono de tiu popolo (2000 homoj), kaj akadianoj ankoraŭ multe fieras pro siaj kulturo kaj lingvo. En 1621, la angla reĝo James I (pr. Ĝejmz) donis Novan Skotlandon — ĉiam konata kiel „Nova Scotia" (pr. Nova Skoŝa) laŭ la latinlingva ĉarto — al skota kavaliro, sed la unuaj kolonioj ne sukcesis. Enmigrantoj de Skotlando kunportis keltan kulturon kaj la gaelan lingvon al la Insulo Kabo-Bretona. La lingvo iom post iom malaperas, eĉ dum oni daŭre instruas kaj studas ĝin, sed kelta muziko nuntempe furoras en la provinco. Eĉ antaŭ kaj certe post la usona revolucio alvenis de Usono ondoj de anglaj enmigrantoj lojalaj al la angla reĝo.

Aliaj eskapis sklavecon en Usono, aŭ alvenis de afrikaj landoj kiel Sieraleono por pasigi ankoraŭ malfacilajn vivojn ĉi tie. Nov-skotianoj ne ĉiam estis tiel bonvenigaj. Irlandanoj venis plejparte al la urbo de Halifakso en la unua triono de la 19-a jarcento, kune kun pli da angloj kaj skotoj. Antaŭ cent jaroj alvenis homoj de diversaj orient-eŭropaj landoj por trovi laboron en la pezaj industrioj de ŝtal-produktado kaj karbo-minado en Insulo Kab-Bretona. Tiuj industrioj nuntempe iom post iom fermas siajn pordojn, sed la homoj el Ukrainio, Pollando kaj aliaj landoj jam postlasis siajn influojn en industria Nova Skotio. En Halifakso oni festas la bonvenigon de miloj da enmigrantoj tra Kajo-21 inter la jaroj 1928 kaj 1971. Nuntempe troviĝas tie historia ekspozicio pri enmigrado. Dum la pasintaj 50 jaroj homoj alvenas de la tuta mondo. Oni ne forgesu ke troviĝas eta sed fervora komunaĵo de esperantistoj kiuj ĉiam estas pretaj bonvenigi, eĉ gastigi aliajn esperantistojn. Oni povas trovi nomojn, inter alie, en Pasporta Servo.

La longdaŭran konflikton inter Anglio kaj Francio dum la 18-a jarcento simbolas du imponaj fortresoj postlasitaj de la imperiaj povoj en Nova Skotio kaj nun re-konstruitaj. La marbordan fortreson de Louisbourg sur la insulo de Kabo Bretono oni jam rekonstruadas, kaj dum la somero vizitantoj estas portitaj malantaŭen al la jaro 1744, kiam komenciĝis milito inter Anglio kaj Francio kaj kiam Francio esperis povi regi la nordamerikan navigadon. Oni povas vidi homojn kiuj ludas la rolojn de lesivistinoj, vendistoj de pano, soldatoj, nobeloj kaj muzikantoj en tiutempaj vestaĵoj kiuj faras siajn tiutagajn agadojn. Francio kelkfoje perdis tiun fortreson antaŭ ĝia detruo en 1760. Por starigi propran centron de povo, la angloj fondis en la jaro 1749 la urbon de Halifakso ĉe granda haveno, kaj konstruis (kvarfoje, laste inter 1828 kaj 1856) montetan fortreson nomitan „la Citadelo”, kune kun diversaj aliaj fortikaĵoj ĉirkaŭ la haveno. Oni neniam devis defendi la Citadelon kontraŭ atako. Nuntempaj vizitantoj povas vidi junajn homojn vestitajn kiel britaj soldatoj de la 1800-aj jaroj en siaj ruĝaj jakoj, kaj muzeojn kaj ankaŭ bonan vidaĵon de la haveno kaj urbocentro de Halifakso. Oni ankaŭ povas vidi kaj aŭdi la tagmezan kanonon, kiun oni pafis preskaŭ ĉiutage dum pli ol jarcento. De la oficejtura laborejo en la urbocentro ankaŭ mi aŭdas ĉiutage tiun kanonon. Tiu tradicio rememorigas ankaŭ min ke *jam temp' esta'* por tagmanĝi.

La „urbo de arboj”, Halifakso estas sufiĉe granda por esti kosmopolita centro de komerco kaj registaro kaj universitatoj ktp, kaj samtempe sufiĉe malgranda por resti amikema urbo, kie homoj pli ofte konas unu la alian kaj ĝuas iom pli malrapidan vivstilon. La malnova parto de la urbo aspektas iomete kiel konko de tridakno, preskaŭ ĉirkaŭita de akvo. Oni ankoraŭ sentas la influon de la mararmeo, aparte kiam fremdaj ŝipanaroj frekventas urbocentrajn drinkejojn kaj noktoklubojn.

Krom la destrojeroj, fregatoj kaj submarŝipoj de la mararmeo, oni ankaŭ vidas gigantajn kontenerŝipojn, ŝipojn de la Marborda Gardisto, grandajn kaj luksajn pasaĝerŝipojn, kargoŝipojn por aŭtoj aŭ gipsoŝtono aŭ petrolo aŭ diversaj aliaj kargoj, kune kun pramŝipetoj, turistaj boatekskursoj, velboatoj kaj la porokaza usona aviadilŝipo aŭ oceana borstacio. La havenkvartalo multe ŝanĝiĝis kaj evoluis dum la pasintaj 30 jaroj, de tempoj kiam ekzemple stivistoj oportune lasus fali keston de oranĝoj el Jaffo kiuj tiom bongustis, ĝis tempoj kiam ĉio alvenas en konteneroj, eĉ

de tempo al tempo rifuĝintoj. Ĉi-monate vizitas grandaj velŝipoj dum speciala konkurso ĉirkaŭ la norda atlantika oceano. Tiuj ŝipoj pensigas homojn pri malnovaj tempoj kaj pri la tradicia heredaĵo de havena urbo.

Kiel reprezentanto de Nova Skotio dum la vizito de tiuj velŝipoj partoprenas la skuno Bluenose 2-a, kiu estas kopio de Bluenose (Blua-nazo), la plej fama kanada ŝipo. Bildo de tiu ŝipo aperas sur la 10-cenda monero ekde 1937. Bluenose estis elstara fiŝkapta skuno de la 1920-aj kaj 30-aj jaroj kiu gajnis multajn premiojn en velŝipaj konkursoj. Kiam oni unue starigis Internacian Pokalon de Fiŝkaptistoj en Halifakso en 1920, la unua gajnanto estis usona skuno el Gloucester. Halifaksanoj rapide komisiis la konstruon de Bluenose ĉe Lunenburg, por pli bone konkursi kontraŭ la usonanoj. Bluenose ja gajnis la pokalon en 1921 kaj sekvantaj jaroj, sed ne kontraŭ tiu unua gajninto, kiu jam pereis en ŝtormo en 1921. Tiu usona skuno, unue lanĉita en 1906, havis la nomon „Esperanto”.

La havenkvartalo de Halifakso nuntempe estas pli alloga por turistoj pro la fakto ke oni povas facile promeni proksimume du ĝis tri kilometrojn, de Kajo 21 al nova granda kazino. Oni pasas diversajn interesajn vidindaĵojn, ekzemple Elektropoliteno, kiu estis centrejo sed nun fariĝis grandega son-scenejo por filmistoj. Ĉe la Marborda Muzeo de la Atlantiko oni povas vidi diversajn artfaraĵojn en la konstruaĵo, kaj lerni pri tragedioj kiuj tuŝis Halifakson. Multajn kadavrojn trovitajn post la pereo de Titanic en aprilo 1912 oni entombigis en Halifakso. Post kvin jaroj kaj duono la halifaksa eksplodo detruis la nordan parton de la urbo kaj mortigis 1600 homojn. La 6-an de decembro 1917 municia ŝipo koliziis kun alia ŝipo en la norda parto de la haveno, kaj la eksplodo kiu sekvis post 20 minutoj estis la plej granda antaŭ la eksplodo de Hiroshimo. Ekster la muzeo, oni povas viziti du ŝipojn. CSS Acadia estis la unua kanada hidrografia ŝipo, kaj HMCS Sackville estas la lasta korveto, militŝipo kiu gardis konvojojn de ŝipoj trans la atlantika dum la dua mondmilito.

Estas diversaj aliaj vizitindaj allogaĵoj en Halifakso kaj tra la provinco de Nova Skotio. En la sekvanta numero, ni iomete pli skizos eventojn kiuj okazas dum la somero.

— Bob Williamson

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

**NdlR: Antaŭ unu jaro Ralph Harry vizitis Nov-Skotion post sia partopreno en la Berlina UK. Tiam li jam pensis pri ĉi tiu komparo. Por tiuj, kiuj mem ne povas aŭdi lian voĉon pere de retradio, jen (iomete redaktita) transskribo. La programero ankoraŭ troviĝas ĉe la retpaĝo de Anton Oberndorfer (Esperanta Retradio) ĉe la jena adreso: http://linz.orf.at/gast/antobern/retradio/progr2m2.html**

# RALPH HARRY PRI LA ESTONTECO DE ESPERANTO

**aŭdigita per Radio Pollando la 23-an de julio 2000**

**En tiu aŭstralia kaj nov-zelanda kongreso ni multe parolis pri la estonteco, pri la estonto de nia movado, kaj tio en rilato kun la estonto de la mondo, fakte. Oni invitis min — ĉar mi havis relative longan sperton pri la lingvo kaj mi legis la historion kaj ankaŭ konis multajn pionirojn de la movado — antaŭvidi kio okazos en la venontaj jaroj. Mi faris komparon kun la historio de la movado por starigi metran sistemon de mezuroj. Estis problemo kiu tre similis al la ĝenerala problemo de la lingvoj. Estis en la 18-a jarcento ke la sciencistoj de la mondo ekkomprenis ke ili urĝe bezonas sistemon de mezurado — de longeco, de pezo, ktp — por ke ili povu kompari siajn rezultojn, la rezultojn de sia enketado por atingi la sekretojn de nia universo. La tiamaj sciencistoj en diversaj landoj, sed super ĉio en Francio, evoluigis la metran sistemon. Ĝi prenis la arabajn numeralojn ĉar ni (t.e. ĉiuj homoj) havas dek fingrojn, kaj ili kunmetis tiun metran sistemon "de metroj, kilometroj, litroj, kilolitroj, ktp" do, estis bona sistemo. Sed la ŝtatoj, kiuj havis siajn tradiciajn sistemojn bazitajn sur la (gambo), la (ulno) aŭ iu alia natura fenomeno, diris ke tiu sistemo estas artefarita kaj oni ne povas akcepti nenaturan sistemon de mezurado. Oni iomete mokis ĝin sed tiam venis la franca revolucio kaj la mensoj kaj cerboj de la homoj estis multe liberigitaj, ĉar ili povis multe pli libere interparoli ktp. En tiu periodo oni starigis asembleon de la franca popolo. La francaj sciencistoj trovis personon nomitan Talleyrand, kiu estis politikisto sed kiu fariĝis eminenta diplomato, kaj ili persvadis lin proponi kaj subteni la enkondukon de la metra sistemo, kaj li sukcesis. Ne nur Francio adoptis tiun sistemon sed ankaŭ, per la armeoj de Napoleono, oni transigis ĝin kaj starigis ĝin en diversaj landoj de Eŭropo, kaj el tio aliaj landoj eĉ ekster Eŭropo akceptis ĝin. Ĝi fariĝis preskaŭ universala sed nur la angla-parolantoj de Anglio preferis la antikvan sistemon; tie kaj la usonanoj kaj eĉ en Aŭstralio ĝis 1966 ni ne akceptis la metran sistemon. Sed jen estas modelo por Esperanto. Mi kredas kaj antaŭdiris ke, post kelkaj jardekoj certe, ni havos revolucion. Ne similos al la franca kaj mi esperas ke la rezulto ne estos diktaturo kiel Napoleono, sed mi kredas ke mi jam vidas la signojn. Oni pensos pli libere kaj oni forĵetos multajn antaŭjuĝojn. Tiam, se ni povus trovi personon aŭ organizaĵon — eble Unuiĝintaj Nacioj — kiu tion akceptus, ni havus internacian helplingvon.**